

KONTAKTO

numero 242 (2011:2)

Sano

Plurfaza dormo

Vojaĝo

Solidareco en
Tanzanio

Vidpunkto

Stereotipoj kaj
realaĵoj

Nuklea Energio La necesa risko

Intervjuo kun Patrik Austin, la kantisto de Dolchamar



tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org

MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menci
kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en
TEJO, kvankam ili multegas: Vi estas en kontakto kun
tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta
kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto,
kiun ĉiu membro ricevadas; tutmonde gastigas kaj
gastas pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povas pli
favorpreze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj
esperantistoj el la tuta mondo.

Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 242 (2011:2), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: <http://kontakto.tejo.org>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felício

Korektisto: Rob Moerbeek

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev (Rusio), Alexandre Baudry (Francio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio), Simon K. Barney (Usono), Etsuo Miyoshi (Japanio), Facilinvaj artikoloj estas verkita en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

Anoncarifto: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekster-movadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifto: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retejo.

Malfortvidantoj: povas rete ricevi voĉlegitajn artikolojn senpage. Petu ĉe Vasile Gavrilan <pan-gavrilan@gmail.com>

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Redakcie

Nuklea energio estas nia ĉeftemo ĉieldone. Ĝi estas multe diskutata lastatempe pro la akcidento en la Fukuŝima nuklea centralo, kiun kaŭzis la tertremo en Japanio. Kompreneble la tertremo mem kaj ĝia sekvanta cunamo estis la granda katastrofo, kiu mortigis 14 mil homojn kaj malaperigis 9 mil aliajn, sed la spuroj de unu kondukis al alia, kaj kreskis la timo ke nuklea katastrofo povus ankoraŭ pli suferigi la japanan popolon.

Etsuo Miyoshi rakontas tamen ke la situacio nun estas pli bona, sed ke nia elpezemo estas la kaŭzo, kiu propulsas la laŭ li danĝeran kaj riproĉeblan nuklean energion. Siaflanke Rafael Zerbetto en sia artikolo konkludas ke la nuklea energio estas la plej bona opcio. Kiuj estas ĝiaj veraj avantaĝoj kaj riskoj? Toño del Barrio, esperantisto, kiu laboris en la kerno de nuklea centralo prezentas analizan vidpunkton pri la temo.

Unu el miaj unuaj Esperantaj Ko-diskoj estis "Lingvo Intermonda" de Dolchamar, kiu tiam miksis elektronikon kaj rokmuzikon. Ĝi tre malsimilas al la lasta albumo de la grupo: Trajn' nenien. Nia intervjuo sekcio ĉi-foje enketas Patrik Austin, la kantiston kaj ĉefon en la grupo pri la nova direkto, pri la albumo kaj estonteco.

kiom da dormo-horoj vi bezonas? Mi fariĝas iom mallerta se mi ne dormas 8 horojn, tamen ekzistas homoj, kiuj dormas tre malmulte. Kiah Morante, en sia kontribuado asertas ke kapablas dormi nur 2 horojn ĉiutage. Certe vi scivolos kiel oni povas tion fari. Legu la artikolon en paĝo 6. Ĉu vi kutime staras...sur via kapo? Kiam mi ricevis la informojn pri la Internacia Klubo de surkape starantoj, mi une pensis ke temas pri frenezaĵo. Nu, ankoraŭ mi pensas tiel, sed la mondo "malfre-neza", kie ni vivas ne aparte perfektas - kun militoj, disputoj kaj problemoj. Eble en tia perspektivo la mondo aspektos pli bona. Mi devas iam provi.

Ni starigas novan rubrikon: Vidpunkto, en kiu vi povas esprimi libere vian... vidpunkton. Pliajn interesajn artikolojn vi legos, kiel pri laboro de Esperantistoj en Tanzanio, la Blaga Blogo, kiu ĉi-foje solvas murdkrimon, kaj movadaj novaĵoj de TEJO-Tutmonde. Ne forgesu viziti nian retejon kaj kontroli kiuj estas la temo-sugestoj por venontaj eldonoj. Ne hezitu ankaŭ proponi al ni temojn.




Foto: Manuel Pancorbo

ENHAVO

Reagoj, novaĵoj	4
Intervjuo Dolchamar - Ne plu juna, nek idealista	5
Vojaĝo Esperanto kaj solidareco kuniĝis en Tanzanio	8
Ĉefartikolo Nuklea energio, La necesa risko	10
Nia elspezemo propulsas nuklean energion	11
Inter riskoj kaj timoj	12
Nuklea energio, La plej bona opcio	14
La Blaga Blogo Blogo de piano-agordisto	15
Sano Plurfaza Dormo	16
Kino La unua Esperanta Kinofestivalo	17
Vidpunkto Stereotipoj kaj realaĵoj	18
Kuriozaĵo Internacia Klubo "Staru sur via kapo"	19
TEJO tutmonde	20



Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontaktu nin per la retadreso kontakto@tejo.org

Mi skribas por informi ke mi bone ricevis la novan version de la revuo Kontakto, mi opinias ke, ĝi estas tre riĉa je interesaj kaj utilaj informoj, tial mi deziras gratuli ĉiujn pro la bonega laboro.

Guillermo

Kubo

Mia fianĉino hodiaŭ ricevis la novan eldonon de Kontakto kaj ĝin montris al mi. Ŭaŭ! Kian belan profesion aspekton ĝi havas. Mi

certe uzos ĝin ĉe ekspozicioj, ĉar ĝi montras al aliaj, ke Esperanto ja rilatas al la nuntempo. Ĝi estas perfekta reklamaĵo.

Tim Owen

Britio

Gratulon! Via blaga blogo estas vere tre amuza :-)

Erzsébet

Hungario

REVUO "KUNKATO"



"Ŝi abonas nur bonkvalitajn legaĵojn ;)"

Fotis kaj komentis: Przemyslaw Wierzbowski - Pollando

NOVAĴOJ

Alvoko al solidareco



Redaktoro de la revuo La Ondo de Esperanto, Aleksander Korĵenkov kaj lia edizno, la refondinto de la revuo, Halina Gorecka, kiu suferas gravan malsanon, sciigis en redakcia kolumno de la marta numero ke ili travivas malfacilan situacion kaj bezonas helpon, kiu povas alveni en diversaj manieroj.

Pliajn informojn kaj kiel helpi vi trovas ĉe:

<http://sezonoj.ru/2011/03/grava-sango-en-nia-vivo/>

Intervjuo

Redaktoro Rogener Pavinski estis intervjuita de ĈRI – Ĉina Radio Internacia pri Kontakto.

En la Esperanto-elsendo de la radio, la redaktoro per telefona babilado eksplikis siajn novajn konceptojn por redakti la revuon.

Aŭskulti la intervjuon eblas ĉe:

<http://esperanto.cri.cn/641/2011/03/25/1s122517.htm>



Ĉu vi volas esti informata aktuale?

Jen por vi ekzistas blogo de TEJO Tutmonde ĉe www.tejo.org.

Ĝia adreso estas: <http://www.tejo.org/eo/blog/8543>

Tie vi trovos la plej aktualajn informojn pri junulara agado tutmonde!

Aŭskulteblaj artikoloj

Por malfortvidantoj aŭ simple por tiuj, kiuj deziras, eblas ekhavi voĉlegitajn artikolojn el la revuo Kontakto. Nia leganto Vasile Gavrilan registris kelkajn, kiuj jam troviĝas ĉe nia retejo.

Dolchamar

Ne plu juna, nek idealista

DE ROGENER PAVINSKI

Dolchamar estas finna muzikgrupo, sed tiu ĉi nomo antaŭnelonge estis kvazaŭ sinonimo por "Ĉu vi pretas?!" - titolo de ĝia unua ŝlagro de ĝia unua albumo "Lingvo Intermonda" de 2000. La sinonimo ŝanĝiĝis, la ŝlagro en 2005 estis "Junaj Idealistoj" de la dua albumo "Rebela Sono". Ambaŭ muzikaĵoj kaj respektivaj albumoj furoris inter junaj esperantistoj.

"Trajn' nenien" la tria albumo de la finna bando, kiu koncipiĝis en la fruo de la jaro 1999, prezentas novan stilon por sia muziko samkiel okazis inter la unua kaj dua albumoj. Ĉu "Trajn' nenien" same plaĉos al la publiko, kiel la antaŭaj? Tion provas repondi Patrik Austin, la fondinto kaj kantisto de la grupo en la intervjuo por Kontakto.

La muzikgrupo ĉiam travivis ŝanĝojn - konsiste, muzike kaj ĉe nome - de Dolcxamar al Dolchamar, kaj preskaŭ Dolĉamar. Sed la metamorfozo ankaŭ atingas la kantiston Austin, kiu rakontas ke la bando jam ne estas la sama kaj ke ne plu indas esti idealisto. Ĉu estonte Dolchamar estos sinonimo por "Maljunaj konformistoj"?

Kiu estas la diferenco inter Dolcxamar de "Lingvo intermonda" kaj Dolchamar de "Rebela Sono" kaj "Trajn' nenien"? Kiel la publiko reagis al ĝi?

Oni povas diri, ke Lingvo Intermonda estas elektronika muziko,

Rebela Sono estas rokmuziko kaj Trajn' nenien iuspeca "monda fuzio". Verdire la albumojn faris krom mi preskaŭ tute diferencaj muzikistoj, kaj tial la muziko ŝanĝiĝis. La intenco estis ĉi-foje skribi Dolĉamar ĉapelite, sed fakte mi forgesis ŝanĝi

tion en la kovrilo. Mi uzis piratajn programojn, kiuj tute fuŝis mian komputilon, sed sukcesis savi la bildon, kiu nun estas.

Komence kelkaj homoj ŝajnis esti iom suspektemaj pri la albumo, sed certe estis ankaŭ tiuj, kiuj tuj ŝatis ĝin. M.T.R. estis jam sukcesa en niaj koncertoj en Esperantio antaŭ la apero de la albumo.

Kial "Trajn' nenien" estis unue lanĉita en la reto kun la nomo "Trejn tu Noŭer" kaj nur poste sur oficiala KD? Kiu estas la diferencoj inter tiuj du versioj?

Trejn tu Noŭer estas la originala versio pri la albumo. Ĝi estas multlingva kun tekstoj en la angla, la franca kaj la hispana krom Esperanto. La propono fari tut-Esperantan albumon venis de la diskeldonejo Vinilkosmo, kaj laŭ mi estis amuze fari ankaŭ tion kaj havi la albumon en kd-formato. La Esperanta albumo havas pli bonan sonon kvankam ĝi estas iom pli simpla, ĉar mi ne aldonis novajn tekstojn por anstataŭigi



Dolchamar dum KEF 2005

la alilingvajn partojn, mi nur reregistris kelkajn mankintajn voĉajn partojn.

“Trajn’ nenien” estas ilustrista per bildoj de plaĝo, tamen Finnlando estas pli konata kiel frosta lando. Ĉu iu kialo por tio?

Certe, ni intencis fari ion tre “nefinnan”. Vidu, ke mi kaj miaj muzikistaj amikoj kreskis ludante punk-, rok- kaj metalmuzikon. Metalmuziko estas populara en Finnlando, oni aŭdas ĝin ĉie. Mi persone tediĝis pri ĝi kaj volis fari la malon, kvankam ankaŭ la bandanoj influis

sur la novan stilon. Ni volis lerni ludi la instrumentojn per diferenca tuŝo. Tamen la foton prenis nia drumisto Hannu en Rimini, kiam ni estis survoje de la UK en Florenco al la IJK en Sarajevo – ni volis vidi San Marinon.

En la malantaŭa kovrilo estas bildo kaj frazo kiu diras “Sponsorata de Castro Cola - 5 cendojn por la popolo de Kubo”. Kion ĝi signifas?

Bone, kompreneble temas pri amikara ŝerco, sed eble mi ŝuldas klarigon. Mi estis interŝanĝa studento en la universitato de Lund, en suda Svedio. Mi havis la oportunon loĝi en “Smålands nation”, la iam-fifama alta domo por politike maldekstremaj studentoj. Mi havis ĉambron en la plej supra etaĝo. Tamen, anstataŭ trinki Coca Cola, homoj trinkis “Cuba Cola”, ĉar oni kredis, ke parto de la profito iras al Kubo. Tio tute ne veras, kaj mi iom ridis legante pri ĝi, kiam mi iris al la

kompania retpaĝo por serĉi eventualan reklamemblemon por la kovrilo. La unua ideo estis peti permeson uzi la emblemon de Cuba Cola, sed poste mi tamen kreis tute propran varbmarkon... Kaj se iu akuzas Dolchamar pri trompi aĉetantojn, mi sendos 5 cendojn al Castro!

Dolchamar jam ludis rokon, hiphopon kaj nun ludas popon kaj regeon. Kiel vi difinas ĝian muzikon?

Nu, vi jam difinis... Fakte la muziko denove ŝanĝiĝos, ĉar la nuna bando ne plu ekzistas. Mi havas planon transloĝiĝi al alia lando kaj poste koncerti sola per samplilo kaj aliaj teknikiloj. Ni havis invitojn al Esperantaj festivaloj en la somero de 2011, sed ni ne povos partopreni, ĉar la drumisto havos nupton kaj nuptan vojaĝon ĝuste juni-julie. En tiu situacio laŭ mi ne plu indas ekzerci, ĉar ni ne havas komunan planon por la estonteco.

Ĉu vi planas fari ion similan al Eric Languillat / Inicialoj DC, kiu ankaŭ solkoncertas?

Mi tre ŝatas Inicialojn DC kaj

Recenzo



★★★★

Trajn’ nenien

Dolchamar - 2010

12 titoloj + mp3
karaokeaj versioj de 11
titoloj + Muzikvideo

Bela, tamen malribela sono

Post la eksperimento elektromusika de “Lingvo Intermonda” kaj potenco rokmuziko de “Rebela Sono”, Patrik Austin kaj lia Dolchamar revenas per “Trajn’ Nenien”, la tria albumo de la finna grupo.

Patrik, kaj novaj muzikistoj: La fratoj Andrei (klavaroj) kaj Sebastian Dumitrescu (basgitaro) kaj Hannu Linkola (drumo), prezentas la muzikgrupon Dolchamar en nova stilo. “Trajn’ nenien” havas grandan influon de reĝeo kaj iom da latineca kaj eksperimenta muziko. Tamen la albumo ne aspektas tute fremda. Ĝi ankoraŭ havas ecojn de “Rebela Sono”, eĉ se nun ili precipe sonas multe pli “malribele”.

La grupo intence kuris en kontraŭdirekton de la roka stilo de la antaŭa albumo. La rezulto estas kontentiga, tamen mi persone opinias ke iom pli da roka gitaro ne malbonos ĉar la albumo foje aspektas iom “malvarma”. Tekste ĝi same ne tiom viglas kaj malofte allogas la atenton. Ili aspektas iom simplecaj kaj eĉ timidaj, se vi

komparas kun tekstoj kiel tiu de “Ĉu vi pretas? !”.

La albumo malvarme komenciĝas per “Trajn’ Nenien”, kiu per eksperimenta ritmo malfermas la albumon. La dua peco “2-oje 8-aze” tamen estas la plej sukcesa kanto de tiu nova stilo de Dolchamar - ĝia refreno algluiĝas al via cerbo! Sekvas iom rokeca “M.T.R” kaj “River”, trankvila kanzono kun bela melodio. Sekvas “Klavoj”, laŭ mi la nura granda peco - ĝi estas sensala instrumenta muziko. En Brazilo estas esprimo por tiaj kanzonoj: “Lifta muzikaĵo”. T.e. muzikaĵo taŭga por disaŭdigo ene de liftoj.

Feliĉe la latineca “Ni festis unu nokton” reportas gajan animon al la albumo, kiu estas iom interrompata per “Eksperimento muzika”, kiu sonas iomete kiel Dolchamar en “Rebela Sono”. Venas la plej danciga kaj rapida peco, la punk-skaeca “La pordisto”. Ankaŭ “Ho Abio” latinecas, kaj verŝajne

la sola, kiu enhavas iomete da socikritiko kiam ĝi parolas pri la merkato de la “monda bazo”. Siaflanke “-If-” estas la sola kun elektronika bato.

Ĝia metafora refreno diras: “Tion mi vin soifis; sola rifis; malsiginifis; Kion vi min edifis, alte klifis, min modifis”.

“Des pli” estas iom malĝojeca adiaŭa kanto, kiu ritme similas al la Usona kampareca muziko. “La fariseo” fermas la albumon per pop-reĝea ritmo kaj iom interesa teksto, kvankam mallonga kiel ĉiuj ceteraj.

La sonproduktado estas simpla, kun bonkvalita registrado, sed iom pli da atento al la tekstolibreto bonvenus. La albumo certe plaĉos al multaj, ĝi estas la plej popa kaj trankvila de Dolchamar, sed daŭre ĝi havas bonajn komponaĵojn kaj allogajn refrenoj. Aŭskultebles ke Dolchamar maturiĝis, ĝi prenis trajnon - nenien, sed mi sentas ke la kajo, al kiu ĝi alvenis nun, ne estas ankoraŭ ĝia lasta destino.

Rogener Pavinski

ni bone amuziĝis, kiam Eric vizitis Finnlandon pasintsomere. Sed anstataŭ videoĵoj mi planas koncentriĝi sur la teknikajoj kaj fari muzikon sola sed pli-malpli vive ĉeesta.

Via antaŭa albumo "Rebela Sono" staris ĉe la plej bonaj diskoj en Esperanto. Kial la ensemblo de Rebela Sono disiĝis?

Ne demandu! Estis grandaj kvereloj tiutempe. La klavaristino volis kunigi min kun nia manaĝerino, kaj el tio rezultis katastrofo. Do temis pri inaj problemoj. Muzike mi tediĝis pri la metalroka stilo, en kiu la muzikistoj ludis. Kelkfoje oni devas nur agnoski, ke oni estas en malĝusta kompanio kaj serĉi amikojn aliloke.

Dolchamar estas konata ankaŭ pro la lingvaj ludoj kaj eksperimentoj. Ekde kiam vi ŝatas fari tion?

Verŝajne ekde mia infaneco. Sed mi vidas ankaŭ, ke Esperanta muziko povas funkcii ambigue por homoj, kiuj ne parolas Esperanton, sed komprenas almenaŭ kelkajn vortojn. Fakte muzikisto, kiun mi konas, ĵus verkis kanton inspirite de nia peco "Ni festis unu nokton". Mi iom aŭskultis la tekston, kaj ĝi ĝuste parte similas al la mia, sed ankaŭ aldonas ion novan.



Vi iam asertis ke vi preferas "skii kaj ludi glaciĥokeon semajnfine ol turnei en fumaj drinkejoj". Ĉu tio signifas ke vi prefere tenas muzikon kiel hobion? Ĉu vi neniam havis la intencon vivteni vin per muziko?

Ĉu mi ja diris tiel? Nu, mi estis profesia muzikisto iam en la 90-aj jaroj. Mi amis turnei kaj registri albumojn, sed malamis la reston: la radios-tacian politikon, kontraktojn, muzikgazetojn, la intermuzikistan hierarkion ktp. Krome mi sentis, ke mi ne plene povas esprimi min en rokbandoj. Mi volis fari mian propran aferon, sed devis tro kompromisi por vivteni min, kaj fine mi ne plu volis daŭrigi tiel. Nun mi povus provi denove.

Kiel vi vidas la kreskon de la retaj medioj por distribui muzikon anstataŭ la fizikaj kodiskoj?

Mi persone nuntempe aŭskultas muzikon ĉefe komputile. Antaŭe mi uzis iTunes, sed nun mi preferas Spotify. Nia muziko estas en ambaŭ medioj, sed mi ne jam trovis alian Esperantomuzikon tie. Mi kredas, ke la estonteco de esperantomuziko estos en la sama formato, kiel alia muziko. Kompaktdiskoj estas ankoraŭ bezonataj, sed muzikaŭskultado jam signifaparte estas en interretaj servoj.

Ĉu vi ankoraŭ taksas vin "juna idealisto"?

Vi havas malfacilajn demandojn! Kiam mi skribis la tekston "Junaj idealistoj", ĝi ja temis pri mi, eĉ se iom ironie. Nuntempe mi ne plu vidas, ke indas esti idealisto. Nu, ŝajnas al mi, ke mi antaŭe pensis tro multe kiel la filozofo Immanuel Kant: Oni devas vivi ĝuste, kaj kio estas ĝusta por ĉiuj, estas ĝusta por la individuo. Nuntempe mi vidas, ke mi estas tro diferenca kompare al "la pliparto", ke mi tamen devus sekvi miajn proprajn



Estas la finnlingva rokgrupo, en kiu anis Austin de 1991 ĝis 1997, kiam li translokiĝis al Londono, kie li fondis la Dolcxamar-projekton

regulojn. Krome mi ne plu kredas, ke eblas ŝanĝi la mondon per muziko. Povas okazi, ke mi iel faras mian parton, kaj feliĉe estas multaj aliaj, kiuj sukcesas fari pli ol mi.

Via eksa membro Leena Peisa nun ludas en la Finna rok-grupo Lordi sub la kromnomo Awa. Ĉu vi ceteraj ŝatas la ŝtonrokon de Lordi? (Demando de nia leganto @FechjoCesarano per Twitter)

Neniu el ni aŭskultas Lordi. La aspekto de la bando superbas, sed la muziko estas iom laciga. En Finnlando Lordi iĝis populara inter 3-9-jaraj knabetoj. Poste oni kritikis, ke ĝia spektaklo estas tro timiga por infanoj, kaj aliaj muzikistoj formis porinfanajn metalbandojn kun dinosaŭraj kostumoj. Mi memoras, ke mi tre entuziasmis, kiam Lordi faris sian unuan muzikvideon "Would You Love a Monsterman?" kaj eĉ montris ĝin al Leena, kiu abomenis ĝin! Estas bone, ke niaj amikoj, la knabinbando Clamour, rekomendis ŝin por la bando. Tamen temas pri peza laboro. La maskoj kaj kostumoj estas malkomfortaj kaj ekstreme ŝvitigaj, kaj mi imagas, ke ne plaĉas aŭskulti la kriadon de Sinjoro Lordi ĉiuvespere. Tamen, ĉion por distro!

Kion homoj atendu el Dolchamar estonte?

Espereble venos la koncertoj. Mi havas multajn ideojn, kiel realigi la spektaklon. Sed ĝuste nun mi bezonas paŭzon sen Dolchamar. Kiam venas la inspiro, venas ankaŭ la muziko.■

Esperanto kaj solidareco kuniĝis en Tanzanio

LUC GOUVERNEUR - FRANCIO

En 2007 kaj 2008, Tanzania esperantisto Mramba Simba vojaĝis tra Eŭropo por peti helpon, cele al plibonigo de la vivkondiĉoj de la vilaĝanoj de Salama, kies urbestro li estas. Tiu regiono de Tanzanio, ne for de la lago Viktorio, estas unu el la plej malriĉaj de la lando. Ĉar la Esperanto-klubo de Nanto (Francio) invitis lin okaze de lia restado en Bretonio, Christiane Lamy kaj Maurice Foucher gastigis lin hejme, kaj interparolis kun li detale pri la situacio de la vilaĝanoj de Salama.



Anoj de la Tanzania asocio Mazingira antaŭ sia sidejo

Christiane kaj Maurice, estiel anoj de la franca asocio «Elektristoj Sen Limoj», kiu intervenas en disvolviĝantaj landoj, proponis sian helpon al Mramba. Kun Mramba, ili antaŭvidis du projektojn: Unue, elektrigadon de lernejoj, dispensarioj, kaj loĝejoj de instruistoj kaj kuracistoj, helpe de

«Elektristoj Sen Limoj». Due, de ili mem, kreadon de radio-stacio.

Lasu ilin rakonti siajn travivaĵojn.

«En Oktobro 2009, post du jaroj da preparado kaj planado, ni fine forflugis al Tanzanio, kunportante 115 kg da diversaj radio-materialoj, t.e. miksililo, anteno, aŭskultilo k.s. Ĉe la eliro de la flughaveno de Daresalamo, Mramba Simba jam atendis nin. Ni ĝojis revidi unu la alian, ĉi-foje en lia lando. Akompanataj de li, dum la dudek horoj bezonataj por la perbusa transiro de Daresalamo ĝis Salama, ni finfine atingis lian hejmon. Liaj familianoj iomete timple ne akceptis nin, sed post interkonatiĝo, ni baldaŭ familiariĝis.

Kiel antaŭvidite, en la unua parto de nia restado, la unuajn du

semajnojn, ni vizitis la lernejojn, dispensariojn kaj loĝejojn de la 7 Salamaj vilaĝoj, kunvenis kun la loĝantoj por scikoni iliajn ĉefajn bezonojn (akvo, elektro), renkontis la plej malriĉajn kaj orfajn infanojn, vizitis putojn, arbidejojn ktp. Ni vizitis ankaŭ lokajn entreprenistojn por pritrakti prezproponojn, cele al la elektro-projekto. La distriktestrino kaj ŝiaj subuloj, tre interesataj pri la projektoj, proponis sian helpon, tio estas senpagaj transportadoj de la bezonotaj varoj.

La radio-stacion «Radio Mazingira», kies domo estis ne finkonstruita, ni kreis en la dua parto de nia restado. Helpe de la vilaĝanoj, ni muntis kaj starigis la antenon (12 metrojn alta). Tiu radio, krom aŭskultado de muziko, utilos precipe por solvi parte problemojn de klerigado, estigi kursojn de Esperanto, disvastigi informojn koncerne la asocian vivon de la vilaĝanoj. Plie, ĝi ebligas diskonigi konsilojn kaj rimedojn por antaŭgardi kontraŭ malsanoj, precipe aidoso.



Repago de mikrokredito de virinoj



Starigo de la radio-anteno



Konstruata radio-domo



Radio Mazingira ekfunkcias

Cele al fininstalado de la radio-materialoj, viroj prunteprenis servoprete kaj diligente tablon kaj seĝojn el najbara lernejo. Post pluraj elsendoprovoj, la radio fine ekfunkciis. De malproksime, homoj telefonis tuj de 30 kilometroj por anonci sukcesan ricevadon. Kia ĝojo! Radio Mazingira naskiĝis!

Monato jam pasis, kaj alvenis tempo por foriri. Ĉagrene ni adiaŭis la anojn de Mazingira. Ĝis revido al Njeje, la ĉiam ridetema kontisto. Ĝis revido al Elizabeta, la sekretariino, al James, la putzorganto...

La tri edzinoj de Mramba, Stela, Kadogo kaj Elizabeta kaj iliaj gefiloj malĝoje kaj mute rigardis nin enaŭtigi niajn valizojn. Precipe Semakweri, filo de Mramba, kun kiu ni reciproke kaj konfidence rilatiĝis dum nia restado. Mramba akompanis nin en Mwanza, ĉe la lago Viktorio, kie troviĝas la flughaveno. Surloke, ni konatiĝis kun esperantista amiko de Mramba, Davido, kaj ambaŭ ĉiĉeronis nin plaĉivole ĉien en la urbo, antaŭ nia forflugo. Dum

la flugado hejmen, ni primemoris tiujn afablajn, bonhumorajn kaj gastigemajn homojn, kiuj strebas ĉiutage kaj kuraĝe al plibonigo de siaj vivkondiĉoj. Tiam denove ni sentis korpezon.»



Unu el putoj fosita mem de la vilaĝanoj de Salama.

Decembron 2010: Revenintaj en Francio jam de jaro, Christiane kaj Maurice strebas al realigo de la projekto, kies sukceso dependas de la monsubtenoj, kiujn ili kolektos. Post surloka studado kaj surdosiera pripensado, la efektiva elektrigado de publikaj konstruaĵoj estus

parte pere de konekto al la ŝtata elektra reto, kaj plejparte pere de sunpaneloj. La tuta projekto kostos 50 000 eŭrojn proksimume. Poste la vilaĝanoj havus eblon akiri sunelektran sistemon, dank' al mikro-kredito estigita de la asocio Mazingira.

Christiane kaj Maurice, iom post sia reveno, profitis sendon de kontenero al Tanzanio fare de RFI (Radio Francio Internacia), por kunsendi al Mazingira komputilojn, tablojn, biciklojn, vestaĵojn k.s. ■

Surloke, en Salama, Christiane kaj Maurice renkontis multajn infanojn.

Malfeliĉe, kelkaj estas handikapitaj, kaj bezonas plimalpli gravan operacion.

Mazingira petis ke ili kolektu monon tiucele.

Tial ili mem realigis surdiskan bildaron, kiu prezentas, Esperante aŭ france, iliajn vojaĝon kaj agadojn.

Tiu K-disko aĉetebblas por 20 eŭroj aŭ 25 dolaroj minimume ĉe: Maurice.foucher@cegetel.net sendkosto inkluzivita.

La tutan monon (mondonacojn kaj aĉetojn) ili transdonos al Mazingira por tiuj infanoj.



Unu el la kunvenoj kun la vilaĝanoj



Nuklea energio

La necesa risko

LA REDAKCIO


Elektra energio estas nepraĵo en moderna urba vivo. Estas ne multaj aferoj, kiujn eblas konkretigi sen uzo de elektro. Tamen nur ĉe elektropaneo, kiam ni eniras malluman ĉambron kaj instinkte tuŝas la senutilan lumŝaltilon, ni rimarkas kiom grava ĝi estas en nia ĉiutaga vivo. Eble moderna infano kredas ke, samkiel la lakto, kiun ĝi trinkas, venas el skatolo kaj ne de iu bovino (kiun ĝi neniam reale vidis), la elektro venas el la elektringoj sur la muroj de ĝia domo. Kompreneble, ĝi kreskos kaj eventuale atentus ke, por ke restu ŝalteblaj ĉiuj aparatoj kaj lampoj, kiujn ni ĉiuj havas hejme, devas ekzisti iu energifonto.

Nuklea (aŭ atomkerna) energio estas tre alloga fonto de elektra energio por multaj landoj de la mondo, tiel ĝi nuntempe troviĝas en plejmulto de la ĉefe disvolvitaĵoj kaj industriaj landoj. Ĝi estas produktata per uzo de radioaktivaj materialoj, kiuj tra nuklea reakcio produktas varmon. La nukleaj centraloj uzas tiun varmon por krei akvo-vaporo, kiu uzatas por turni turbinojn kaj produktas elektron.

Nuklea energio fariĝis uzebla por la

ĝenerala popolo de 1956, kiam unu-afoje centralo “Calder Hall” en Britio produktis elektron el ĝi je komerca skalo. En 2009 fukciadis 210 nukleaj

centraloj en 31 landoj kun 436 reaktoroj produktanta la energion de 372 GW. Ili ĉiuj produktas 15% de la monda elektra energio. Usono pro-



 Usono	103
 Francio	59
 Japanio	55
 Rusio	31
 Britio	23
 Sud-Koreio	20
 Kanado	18
 Germanio	17
 Ukrainio	15
 Barato	15

IO unuaj landoj kun plejmulte da nukleaj reaktoroj

duktas plejmulton da nuklea energio, kiu tamen liveras nur 19% de la elektro, kiun la lando konsumas, dum Francio produktas la plej grandan procentaĵon de sia elektro per nukleaj reaktoroj – 80% (en 2006). Nur Usono, Francio kaj Japanio kune, produktas pli ol duonon (56%) de la tutmonda nuklea elektra energio.

Unu el la ĉefaj argumentoj de ĝiaj defendantoj estas ke ĝi estas pli pura energifonto ol naftaj aŭ karbaj centraloj, ke ĝi ne uzas fosilian brulaĵon, kaj tiel ne poluas la medion per forcejefikaj gasoj. Tamen ĝiaj kontraŭantoj kritikas la atomcentraloj pro la fakto, ke ili postlasas atoman rubaĵon, kiun necesas gardi en sekuraj kondiĉoj dum jarcentoj aŭ eĉ pli longe. Aldone, temas pri danĝera teknologio, kaj la demandoj kaj duboj pri ĝia sekureco ĉiam svarmas, precipe post akcidentoj, kiel la plej freŝdata en Fukiŝima 1, kiu same kiel Ĉernobilo estis klasita sur nivelo 7, t.e. la plej alta nivelo laŭ la internacia skalo por nukleaj eventoj.

Eĉ nun, Fukuŝima problemo ankoraŭ ne finiĝis. Nuntempe, pro la etendiĝo de la radioaktiveco, 80 mil homoj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn. Fiŝkaptado kaj terkulturado estis endanĝerigitaj kaj la landa registaro jam decidis fermi unu el siaj plej danĝer-potencialaj centraloj kaj revizios la porestantecajn planojn pri tia energifonto. Nuklea energio povas esti efika kaj moderna maniero ekhavi energion, sed ĉu la riskoj kompenzas la avantaĝojn? Ĉu entute eblas por moderna homo en ĉiuj lokoj de la mondo vivi sendepende de ĝi? Verŝajne ne, pro tio ĝi estas necesa risko, al kiu ni devas simple alkitimiĝi. ■



Nia elspezemo propulsas nuklean energion

ETSUO MIYOSHI - JAPANIO

Laŭ la leĝo de entropio de Jeremy Rifkin, uzi atomenergion estas kiel tranĉi tofuon elektroseĝile. Nur 100-jare vivanta homo ne traktu aĵon, kiu kelkmiljare radioaktivas. Li asertis: ni konstruu spiritan civilizon, kiu, eĉ se malabunda, estos pli riĉa; alie la homaro ne povus pluvivi.

Tervarmiĝo minacas per subakvigo de domoj kaj kampoj kaj Rifkin kaj aliaj sciencistoj gvidas nin. Ni stulte ankoraŭ celas nur ekonomian prosperon, pensas nur pri la sekvaj 5 jaroj kaj fermas la okulojn pri la nepre venontaj 50 jaroj. Ĉu modernuloj estas saĝaj? Se ni ne ŝanĝas la pensmanieron kaj la agojn, la mondo nenovigeblos.

Multaj homoj eraras kredante, ke ili per si mem naskiĝas kaj vivas. Homoj ne povas stari eĉ 1 metron super la tersurfaco, ne povas vivi sen manĝi 100 tagojn, nek sen oksigeno 10 minutojn, nek sen la suno kaj luno 10 tagojn. Do, ne nepre fieru pri grandega providenco de la naturo.

Kunfondinto de Oomoto, Hidemaru Deguchi, verkis: La homoj ĉiam ankoraŭ spitas la volon de Dio kaj daŭrigas sian vojon kontraŭ la granda naturo de Dia ordo. Se la homaro

sin lasos en sama stato, evidente ĝi baldaŭ enfalos en abismon de absoluta seneliro kaj nepre pereos.

La akvospruĉado al la detruita atomcentralo daŭris kelkajn semajnojn. Mi elkore miras, ke kelkcent volontulaj kamikazoj laboradas proksime de la reaktoroj.



Ili estas plenaĝuloj kaj kun infanoj plenkreskaj. Post kiam mi enlitiĝis, miaj manoj premiĝis kaj larmegoj ekfluadis. Mi ne ŝaltas lampon dum sunbrilo kaj malŝaltas elektron laŭeble. Mi vekigis pri nia aroganteco al la

naturo, ĉar nur iom malhela, labora rapideco kaj kvalito tute ne reduktiĝis. La registaro petis nur al tokianoj redukti 25%e la elektrouzon. Nia 4-milione loĝata insulo provizas per 40% da atomelekto. Do, ankoraŭ ne sufiĉas la ŝparoj. Kiel agi?

Post la cunamo la situacio boniĝas kaj nun estas pli sekura ol antaŭe. La Ambasadro sendis jodan pilolon al mia nederlanda sekretario por protekto kontraŭ radiado kaj geamikoj sendis al li manĝaĵojn ĉar ili pensis, ke nenio troveblas. Ŝajne la amaskomunikiloj eksterlande tro katastrofe prezentas la situacion kiel se ĉe ni mankus ĉio por vivi, kaj ne estas tiel... almenaŭ por la plejmulto el ni. ■

Inter riskoj kaj timoj

TOÑO DEL BARRIO - HISPANIO

Mi estas unu el la probable malmultaj esperantistoj kiuj iam laboris en la kerno de kelkaj atomcentraloj, kaj do eble interesos iujn la opinio de homo kiu havas rektan sperton pri tiu ŝajne mistera mondo, ĉar dum multe da tempo mi okupiĝis ĝuste pri radiprotektado en nuklecentraloj, kvankam jam de antaŭ pluraj jaroj mia laborsorto kondukis min for el tiu kampo.

Risvoj kaj timoj

Nuklea energio estas danĝera. Se iu iam diris al vi la malon, tiu simpligis aŭ mensogis. Jen kial ekzistas departementoj de radiprotektado kaj de nuklea sekureco en ĉiuj instalaĵoj uzantaj tian energifonton. Jen kial ekzistas sinsekvaj sistemoj por haltigi la disipadon de varmo kaj sinsekvaj barieroj por enteni la radiaktivan materialon. Ne ekzistas nula risko: tion akceptas ĉiuj homoj tuj ekde kiam ili eklaboras en tiaj instalaĵoj. Simple, oni devas pesi avantaĝojn kaj danĝerojn, minimumigi tiujn ĉi ĝis plej eble, kaj kompari kun aliaj similaj alternativaj por decidi kiuj riskoj estas akcepteblaj kaj kiujn oni ne elportu.

La vidpunkto de eksteruloj malofte estas tia. Por ili radiado estas nova teĥnologio, ŝajne nenatura (kvankam tio ne estas vere tiel), kiun oni utiligas en apartaj kompleksaj instalaĵoj, for de ĉies rigardoj. Krome, ĝi estas nevidebla kaj ne rekte sensebla, por kies informoj oni devas fidi registajn instancojn aŭ grandajn entreprenojn. Kaj la unua kono kiun plejmulto de la homaro havis pri ĝi, estis terura milita hekatombo. Do, ĉiuj ingrediencoj troviĝas tie por ke naskiĝu timo kaj malfido.

Mi do bone komprenas multajn

reagojn de homoj tutmonde pri la nunaj okazaĵoj en Japanio: la atento fokusiĝadas grandparte, almenaŭ en la Okcidenta Eŭropo, sur la riskoj de la nuklecentralo, tre ofte notinde pli ol pri la sekvoj rektaj de la tertremo kaj la cunamo. Certe tio okazas en la amaskomunikiloj, kvankam en tio ĉi probable rolas la drameca karaktero de la novaĵoj, kun konstanta malvolvado de la okazaĵoj, neantaŭvidebla rezulto, partopreno de herooj, ebla identigebleco de malbonuloj...

Mi konfesu ke min multe ĝenas tiu fokusigo sur la nukleinstalaĵo, kaj la preskaŭa forgeso aŭ neglekto de aliaj konsekvencoj. Kiam ekzistas pli ol dek mil mortintoj, kiam ankoraŭ restas pluraj miloj malaperintaj, kiam dekmiloj perdis preskaŭ ĉion kaj supervivis en danĝeraj aŭ malkomfortaj cirkonstancoj, estas maldece ke ĉies atento aperu centrita en unu loko eĉ se drameca. Brulis rafinejo, inundiĝis fabrikoj, eĉ ĥemiaj, disverŝiĝis la enhavo de benzinejoj aŭ petrolujoj, kaj tamen pri ties ĉi sansekvaj neniuj ekster Japanio montras sin alarmita.

Fenomeno pli normala ol oni supozas

La ekspliko, kiel antaŭe dirite, estas klara: nuklecentralo aspektas por plejmulto kiel tute aparta risko, dum por mi ĝi ja estas risko, sed tute komparebla al aliaj ne tiom sekvataj. Nur unu ekzemplo kiu kaptis mian atenton: en multege da periodaĵoj diversloke en la mondo aperis fotoj de homoj blanke vestitaj, mezurantaj radiaktivecon, eĉ al infanoj, kaj mi konstatis ke tio impresis kaj timigis multajn. Por mi tamen tio estas absolute normala. Mi mem estis tiel vestita, kaj por mi tiu blanka supertuto estas tute simila al la blua de meĥanikisto kaj pli logike uzinda ol la kravato kiun mi foje uzas nun. Mi memoras ke tiun veston mi montris al mia panjo kun ĉe ioma fiero, neniel timigite aŭ honte.

Aliflanke, joniga radiado estas nevidebla kaj nesensebla. Sed samtempe ĝi estas tre facile mezurebla, per iloj

ne aparte komplikaj, kaj tre sensivaj. Kaj ni memoru ke la naturo estas radiaktiva: ĉio ĉirkaŭ ni, la aero, la grundo, la akvo posedas radiaktivecon. Kiam ni mezuras radiaktivecon, ni povas detekti eĉ plej malgrandajn kvantojn, kaj tre ofte la problemoj estas kontroli ĉu temas pri signifa aldono super la normalaj niveloj. Eĉ se la respondo estas pozitiva, preskaŭ ĉiam la nivelo estas sensignifa, t.e. ĝi troviĝas ene de la normala fluktuo kiu okazas en la terkrusto, kaj ke la sansekvaj estas tre malaltaj. Do, jen kial tiom oftas miskomprenoj en la raportoj pri ĉeesto de radiaktiveco: vi povas legi la ĵurnaltitolon "detektita radiaktiveco!" kaj sciencajn raportojn "ne ekzistas risko de radiado!", kaj ili povas esti samtempe veraj. Ne mirinde ke nespertuloj sentas konfuzon, kaj timas kaŝecon kaj konspiron. Ja okazas ke aŭtoritatoj aŭ entreprenoj kaŝas informojn, foje malbonvole, sed plej ofte la kialo estas ke oni ne raportas tion kion oni konsideras malgrava.

Politika dilemo

Kiel do homoj kiel mi aliras la dilemon de la nuklea energio? Tre simple: kiel ĉiujn aliajn fenomenojn kiuj enhavas bonaĵojn kaj riskojn. Pesante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kaj komparante kun alternativoj. Ĉar ne temas pri speciala fenomeno, ni traktu ĝin kiel ni traktas la aliajn formojn de teĥnologio.

Unue, jen ekzemplo el la neenergia sektoro: oni povas uzi radiadon por detekti kanceron, ekzemple mamas. La dilemo tie estas tre simpla: oni organizas regulajn kontrolojn per iksoradiado, en la kazo kaj aĝoj en kiu la risko krei kanceron estas pli malgranda ol la ŝanco detekti tiun jam ekzistantan (evidente, mi simpligas pli komplikajn decidproceduron). Same devas okazi ĉe la decido uzi raditerapion aŭ ĥemiterapion aŭ ĥirurgian proceduron en la kuracado de kancera malsano, ĉar ĉi-kaze la radiaktiveco estas simpla ero de la ekvacio.

Pri utiligado en la produktado de energio la decidprocezo devus esti la sama, eĉ se kun pli da eroj en la ekvacio. Oni pesu racie avantaĝojn kaj malbonaĵojn, kaj la respektivajn riskojn de ĉiuj energifontoj. Kaj tie ĉi mi devas substreki evidentaĵon: elektra nukleenergio ja havas riskojn kaj malavantaĝojn. Do, se iam iu diras al vi ke temas pri teĥnika decido, kiun oni lasu al spertuloj, aŭ ke temas pri io tute pura kaj sekura, tute ne kredu tion. Sed same, ĝi ne estas la diablo, kiun oni foje aŭskultas, kaj kiun oni devas kondamni dekomence.

La decido estas politika. Politika en la plej nobla senco, ne en tiu partia, kiun oni ofte renkontas en la debato. Politika, ĉar la elekto dependas de la preferoj kiujn homoj havas en sia socia interago. Iuj homoj tute ne volas sperti riskojn, kaj preferas pli trankvilan vivon, eĉ se pli malriĉan. Aliaj preferas sekurecon en la ricevo de elektro, sen dependado de aliaj faktoroj. Iuj volas pagi kiom eble malplej, aliaj ne hezitas pagi pli se tio havas aliajn kompensojn. Iuj timas komplikajn instalaĵojn kaj grandajn firmaojn, aliaj sentas sin pli protektataj de ili. Al iu ne plaĉas dependi de teĥnologio dominata de iuj superpotencoj, aliaj preferas ne dependi de krudmaterialoj eltirataj en landoj kiujn ili ne fidus. Por mi mem la afero de la reziduoj tre gravas, dum por aliaj tio estas sekundara.

Mi do ne volas fari pornuklean pledon. Mi mem ne havas klaran opinion, kaj ne scias kion mi voĉdonus en eventuala referendumo pri nuklea energio en mia lando. Mi nur volas insisti pri tiu neceso bone pesi la alternativojn. La afero ne estas simpla, kaj certe ne helpas tiu tipa partia divido pornuklea = dekstrema / kontraŭnuklea = maldekstrula, kiu almenaŭ mialande plagas kaj distordas la debaton. Ne devus mirigi ke troviĝas ekologiistoj kiuj ne principe kontraŭas tiun energifonton, kiam oni komparas ĝin kun aliaj alternativoj.

Sed mi komprenas ke timo al katastrofo ne estas neglektinda pesilo. Kiel dirus Zamenhof, timo havas grandajn okulojn. Sed ĝi estas malbona konsilisto, kaj bedaŭrinde la mastrumado de risko en nuntempa socio —en kiu la atento al novaĵoj tiom ofte pritraktiĝas sen atento al kunteksto, kaj kie politikistoj kaj decidantoj tiom timas erari eĉ pri neglektindaj aferoj— tre malfacilas kaj fuŝemas.

Persona noto

Mi devenas el karbominista familio. Miaj avoj, onkloj, kuzoj, paĉjo, miaj du fratoj, pluraj miaj amikoj de infanaĝo, ĉiuj estis ministoj. Por mia ĉirkaŭaĵo, la danĝero fariĝis io ĉiutaga, sed ĝi ne estis la ĉefa bariero por decido, kvankam evidente oni multe batalis por ĝin minimumigi. Kiam miaj fratoj eklaboris en la mino, miaj gepatroj ne kontentis, sed akceptis la riskon kiel parton de la viva ekvacio.

Kiam mi estis laboranta en la nuklea sektoro, ekfermiĝadis la minoj de mia regiono, unu post la alia. Miaj fratoj estis trafita de tiu cirkonstanco, kaj mi helpis en ilia dungigo en mia tiama firmao kaj sektoro. Mi neniel havis problemojn akcepti la nuklean riskon, kaj fakte konsideris kaj plu konsideras ke ilia nova risko estis videble pli malgranda ol la antaŭa, eble nur kompensata pro pli alta danĝero pro pli ofta transporto.

Unu el la fratoj konservas portempan ligitcon kun la sektoro, sed moviĝis aliloken. La alia plu laboras en radiprotektado en nuklea centralo ĝemela al tiu de Fukuŝimo. Fakte, se io simila okazus en centralo kie



La aŭtoro kiam laboris ene de nuklea centralo

mia frato laboras, li sendube estus unu el la laborantoj proksimaj al la koro de la problemo. Mi do sentas la tragedion tie kiel propran, kaj mi scias ke laborantoj en atomcentraloj havas sentojn tre vivajn, eĉ se suprajaj taksoj povas vidigi ion malsaman.

Kaj mi ne dubas ke li agus kiel tiuj herooj. Simple ĉar estas lia devo kaj lia respondeco.

Permesu ke mi finu per aludo al la herooj laborantoj de la instalaĵo de Fukuŝimo. Mi tre ofte legas en hispanaj kaj alilingvaj ĵurnaloj ke la konduto de la laborantoj en la japana centralo ŝuldiĝas al iuj reguloj de devo en la japanio agadmaniero, kaj iuj eĉ parolis pri la honorkodo de samurajoj, kaj pri similaj ŝablonaĵoj. Ne estas tiel: mi certas ke ĉiuj laborantoj en ĉiuj landoj de la mondo agas same. Mia frato kaj ĉiuj liaj kolegoj. Simple ĉar estas lia devo kaj lia respondeco. Same kiel ministoj ne hezitas riski sian vivon kiam iliaj kolegoj estas enterigkaptataj, aŭ fajrestingistoj penetras domon brulantan, tiuj profesiuloj faras kion ili sentas kiel sian devon.

Ili estas herooj, nedubable. Sed estas signo de la tempo ke fari sian laboron estas konsiderata heroeco. Eble ĉar en tiu ĉi socio de konsumado oni forgesis ke laboro estas la ĉefa fonto de digno.

Mia frato estus tre fiera kontribui al la estingo de problemo, mi estus tre fiera je li. Kaj mi konsiderus tion plej normala faceto de la homa vivo kaj de la riskoj kiujn ĉiuj ni devas iam alfronti. ■

Nuklea energio

La plej bona opcio


RAFAEL H. ZERBETTO - BRAZILIO

Poluo kaj estingorisko de nafto, tergaso kaj karbo igas la elektro-produktadon unu inter la plej gravaj defioj por la homaro dum ĉi tiu jarcento. Ĉu nuklea energio povas helpi nin solvi la problemon?

Ekde kiam atombomboj detruis la urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki en Japanio, pluraj homoj asocias nuklean energion kun detruo kaj morto, malgraŭ tio ke, preskaŭ ĉiam, ĝi estas uzata nur por la bono, en medicino, agrikulturo, industriaj procedoj, elektroproduktado ktp.

Ĉiuj estaĵoj estas ĉiam en kontakto kun radioaktiveroj pro tio ke ili nature troviĝas en la sablo, sub la tero kaj eĉ en nia manĝaĵo. Ekzemple, iom de la karbono en niaj korpoj estas la izotopo karbono-14, kiu estas radioaktiva kaj eniras la korpon per la manĝaĵo. Per la detektado de tiu izotopo oni povas datumi fosiliojn.

Estas interese rimarki ke betono estas farita el sablo, kie troviĝas eroj de torio, radioaktiva izotopo, kiu povas, post iom da tempo, diseriĝi en gason radono (radioaktiva) kaj



Premakvaj centraloj (PWR)

disĵetiĝi tra la aero. Nun, imagu ke tiu gaso povas akumuliĝi ene de la metroa tunelo, kie betono abundas kaj aero malbone cirkulas! Eĉ tiel, vi ricevas malpli da disradiado en metroo ol flugante per aviadilo. Finfine, en hospitaloj oni trinkas radioaktivajn substancojn uzatajn kiel kontrastiloj por kelkaj ekzamenoj. Tio certe estus malpermesata se nuklea energio estus danĝera.


Do, kial ne uzi atomcentralojn por produkti elektron? Estas miloj da esploroj kiuj pruvas ke ĝi estas sekura energiofonto. Krom tio, pro novaj teknologioj, atomcentraloj nuntempe estas multe pli sekuraj ol kelkajn jardekojn antaŭe: Sekuresistemoj kutime estas aŭtomataj kaj sendependaj, do, la kontrolistoj nur

monitoras ĉu ĉio estas en ordo kaj, se iu problemo okazas, povas haltigi la reaktoron.

Inter la nuntempaj reaktoroj, la PWR-a (Reaktoro per Premata Akvo) estas la preferata. Tie estas 3 malsamaj akvaj ĉirkaŭiroj: en la unua, ene de la reaktoro, akvo akiras energion el la fisio kaj varmiĝas. En la dua, ekster la reaktoro, akvo estas varmigata de la unua ĉirkaŭiro kaj vaporiĝas, movante la turbinojn. La tria funkcias kiel malvarmigilo, per kiu oni kontrolas la temperaturon de la sistemo. Pro la granda kvanto de akvo en la ĉirkaŭiroj, se ĉiuj sistemoj malfunkcias, la reaktoro nature malvarmiĝos. La ekzisto de tri malsamaj ĉirkaŭiroj malebligas eliron de radioaktivaĵo, ĉar ne estas kontakto inter akvoj ekster kaj malekster la reaktoro.

La Fukuŝima atomcentralo, en Japanio, estas tipe BWR (Reaktoro per Boligata Akvo), kiu havas du ĉirkaŭirojn, unu en kiu la akvo fariĝas vaporo ene de la reaktoro, trapasas la turbinojn kaj tuj poste likviĝas en kondensilo, kaj alia por malvarmigi la unuan ĉirkaŭiron, Akvo de la unua ĉirkaŭiro reeniras la reaktoron pere de pumpiloj, kiuj bezonas elektron. Sen ĝi, la reaktoro varmiĝas pro kresko de la akva temperaturo kaj vaporeliras.

Sed, kial uzi nuklean energion? Ĉu ekzistaj aliaj energiaj fontoj? Unue, oni devas konsideri ke multaj ener-



Bolakvaj reaktoroj (BWR)



Viktoro SOLÉ- Katalunio

Blogo de piano-agordisto

gياج fontoj, kiel akvo, vento kaj suno, dependas de la naturo: kiel produkti elektron el sunlumo dum la nokto aŭ el vento kiam ĝi haltas? La homaro ĉiam bezonas vaporenergiajn centralojn (atomaj, karbaj, gasaj aŭ naftaj), almenaŭ kiel helpofonton, ĉar ili permesas al ni produkti elektron laŭ la neceso. En 2001, ekzemple, pro longdaŭra manko de pluvoj en Brazilo, kelkaj hidroelektraj centraloj malgajnis potencon. Aliflanke, por kompensi tion, atomaj, naftaj kaj gasaj centraloj ekfunkciis je la plej granda potenco.

Inter la vaporenergiaj centraloj, la atomaj estas la plej malpoluemaj: karbaj, gasaj kaj naftaj centraloj ĵetas al la aero kancerogenajn metalojn, radioaktivajn erojn kaj gasojn kiuj kontribuas por acidaj pluvoj kaj forcejefiko. Krom tio, karbaj centraloj produktas tunojn da cindroj kaj aliajn solidajn rubaĵojn, dum la plejmulto de atomcentrala rubo estas vestoj kaj iloj iomete radioaktivaj kiuj povas, post kelkaj jardekoj, esti reuzataj aŭ miksataj kun ordinara rubaĵo. Nur la nuklea brulaĵo elprenita de la reaktoro estas vere danĝera, sed, teknike, ĝi ne estas rubaĵo, ĉar ĝi povas esti reprocesata kaj denove uzata kiel nuklea brulaĵo.

La kostoj de elektro-produktado multe diferencas inter landoj kaj regionoj, ĉefe pro abundo de iu specifa fonto, impostoj kaj politikaj elektoj, sed nuklea energio ordinare estas tiel kosta kiel elektro el aliaj vaporcentraloj. Sunenergia ankoraŭ multekostas por esti uzata kiel ĉefa fonto, krom en indiĝenaj kaj aliaj apartaj komunumoj. En vastaj kaj riverplenaj landoj estas pli interese la konstruado de hidroelektraj centraloj, kvankam pro tio oni devas inudigi vastajn agrikulturemajn regionojn. Atomcentraloj, kontraŭe, ne bezonas grandan terenon kaj povas esti konstruataj relative proksime de la urboj, kio malpligrandigas la elspezojn pri transporto de elektro.

Konstruado de elektrocentralo estas bazita sur pluraj studoj pri riskoj, kostoj, poluo kaj pluraj teknikaj detaloj kiel centrala efiko kaj tempo necesa por ĝia konstruado kaj ekfunkciigado. Depende de lokaj kondiĉoj kaj necesoj, multfoje atomcentralo estas la plej bona opcio. ■

Miafake oni devas bone aŭskulti. Ne nur temas pri aŭdado de notoj sed ankaŭ de kelkaj bruetoj, kiuj diras al ni, ĉu du kordoj estas bone agorditaj. Fakte, ni preskaŭ neniam aŭskultas rekte la notojn, por ni pli gravas la harmonoj, tio estas, altaj kaj malfortaj sonoj kiuj akompanas la ĉeftonojn. La harmona mondo estas reve belega. KREDU MIN. Nefakuloj povas iomete sperti ĝin aŭdante sonorilon. Pli bone grandan sonorilon, ekzemple la vilaĝajn sonorilegojn. Se vi atente aŭskultas ilin vi aŭdos, ke krom la baza sonorila sono estas amaso da pli altaj malfortaj sonoj, kiuj interskuiĝas kaj kreas belegan simfonion, kiu daŭras sufiĉe da tempo.

Alia rilata afero estas resonanco: “aĵo kapabla je vibrado, forte vibras reage al ekstera faktoro je preciza frekvenco...”. Bone, tio estas amuza afero. Ĉiu muzikisto rimarkas tion: kiam gitaro aŭ violono ricevas frekvencojn, kiuj kongruas kun la frekvencoj de iliaj propraj kordoj, tiuj kordoj eksonoras. Sed ne nur temas pri tio.

Se vi havas pianon, faru tiun iomete timigan eksperimenton: puŝu ĝian dekstran pedalon (por liberigi la kordojn), kriu apud la kordoj kaj vi aŭdos kiel ili reagis al via krio. Estas tre kurioze, ke la pianaj kordoj ne nur eksonas reage al via krio, sed ankaŭ imitas ĝin. Se vi krias per “iiii” vi aŭdos “iiiiii”, se vi krias per “oooo” vi aŭdos tion, se vi diras “eeeeoooo” vi tion aŭdos.

Sed kio vere estas timiga, estas la jena historio, kiun maljuna agordisto tradicie rakontas al novalveninto kune kun profesiaj sekretoj: temas pri fama pianisto, J.K. Kornack, kiu estis murdita kiam li estis ludanta pianon. La legendo diras, ke li vidis la murdiston, kaj ke li kriis lian nomon lastmomente. Tiam li falis sur la klavaron kaj lia dekstra piedo, kiu estis puŝanta la dekstran pedalon, perdis sian forton. La polico enketis la aferon, sed nenion interesan trovis.

Kelkajn tagojn poste, la vidvino petis la agordiston, ke li agordu kaj riparu (se necese) la pianon. Kaj kiam la agordisto puŝis la dekstran pedalon, el la ĵus liberigitaj kordoj eliris mallaŭte sed aŭdeble la kriita nomo de la murdisto, kiun ili gardis ekde la tragika momento: “Eeeee-riiiiick”. La vidvino subite svenis. La agordisto rakontis tion al la polico kaj la afero baldaŭ klariĝis: “Eeeee-riiiiick” estis Erick K. Wilson, amiko de Kornack, kaj ankoraŭ “pli amiko” de la vidvino. Ambaŭ planis murdi la pianiston por ricevi ne malgrandan heredaĵon kaj ekkomenci novan vivon kune.

Iuj diras, ke tio estas vero, aliaj opinias male. Sed atentu kion vi diras, kiam vi estas apud piano. ■



Plurfaza Dormo

KIAH MORANTE - AŬSTRALIO



Mi dormas nur 2 horojn kaj duonon ĉiunokte. Leginte tiun frazon, vi eble unue supozus, ke mi havas ian kompatindan malsanon, kaj ke la sendormeco terure detruas mian vivon. Tio fakte ne okazas. Efektive, mi estas plene sana, plene feliĉa kaj energia. Fakte mi estas eĉ pli energia nun ol kiam mi dormis 9 horojn ĉiunokte. Temas pri plurfaza dormo.

Kio estas?

Plurfaza dormo estas dormi plurfoje en unu tago. Beboj plurfaze dormas nature. Ili dormetas multfoje, ĉiutage, kaj ni kutimas eĉ kuraĝigi infanĝardenanojn dormeti tagmeze. Ni poste trejnans infanojn dormi unufaze. Oni povas trejni sin denove dormi plurfaze, kaj tiam oni bezonas nur inter 2 kaj 4 horojn da dormo ĉiunokte. Sed kiel tio povus funkcii?

Ni konfesas ke ni ne scias multon pri plurfaza dormo kaj la fakto ke ĝi funkcias estas mistero al ĉiuj. La plejmulto da akademia esploro temas pri unufaza dormo. Tamen, ni povas fari kelkajn divenojn.

La dormociklo

Kutime, plenkreskulo dormas ĉiunokte en 5 aŭ 6 cikloj 90 minutojn longaj (= 7.59 horoj). Ĉiu ciklo estas dividata en partojn. Dum unu 90-minuta ciklo, la partoj estas: NREM1, NREM2, NREM3, NREM2 kaj REM, en tiu ordo. REM estas mallongigo de Rapid Eye Movement (rapida moviĝo de okuloj). NREM estas mallongigo de NonREM (Ne-REM).

- **NREM1:** La unua parto de la dormociklo, kiam oni transiras el veko al dormo. Dum tiu tempo, oni ofte vidas hipnogajn bildojn, kiuj estas sonĝeraj videblaĵoj, sed oni ne spertas plenajn sonĝojn. Post kelkaj minutoj tiam oni transiras al NREM2.
- **NREM2:** La korpo malrapide ripozas, kaj cerbandoj plilongiĝas.
- **NREM3:** La plej malleĝera parto el la NREMoj, en kutima 90minuta dormociklo, ĉi parto okazas post 3045minutoj. Deltajn ondojn produktas la cerbo, la koro batas plej malrapide kaj la cerbo fariĝas plej malvigla. Tiam oni renverse iras laŭ la ordo reen al

NREM2. Post tio komenciĝas REM.

- **REM:** Dum REM, la cerbo preskaŭ tiom viglas kiom veke. La korpo estas paralizita por ke oni ne povu fizike fari kion oni faras en la sonĝa mondo kaj pro tio defali el sia lito.
- **Post REM,** oni ofte nelonge vekiĝas, sed tion oni kutime ne memoras post ellitiĝo. Se oni vekiĝas post REM, oni rekomencas la dormociklon ĉe NREM1. Se oni ne vekiĝas, oni reiras al NREM2.

Dum la plej malleĝera parto de dormo, oni sonĝas, ĉefe dum REM, sed ankaŭ iomete dum NREM3. Dum NREM3, la korpo eldonas hormonojn kiuj helpas al la korpo ripari sin.

Modifi la dormociklon

Ni malmulton scias pri NREM1 kaj 2, sed ŝajne oni povas 'pretersalti' ilin, aŭ almenaŭ multe malpliigi ilin, kaj ankoraŭ bonfarti. Por fari tion, oni bezonas lerni novan dormociklon. Plurfazaj eksperimentantoj trovis ke 20 minutoj ŝajnas esti la plej efika dormeto, sed kelkaj raportis ke ankaŭ 30-minuta eblas por ili. Iusence, plurfaza dormo ne estas sendormeco, sed pli efika dormo, kaj pro tio oni bezonas malpli multon.

Problemo estas ke por reprogrami la cerbon dormi pli efike, oni devas dividi la dormociklojn. Se oni ekdormus nun, kaj onia alarmo vekas onin post 20 minutoj, oni estus laca kaj malkomforta. Tio estas ĉar oni eĉ ne finus unu dormociklon. Sed, se oni farus tion tre ofte, post longa tempo onia cerbo adaptiĝas al 20-minutaj dormetoj, kaj oni vekiĝas freŝe. Tamen, se oni vekiĝas pro la alarmo kaj tuj reekdormas, oni simple eniras la saman dormociklon de la lasta dormo. Tial oni bezonas iom da tempo inter dormetoj por ke oni povu efike dormi, kaj tial plurfaza dormoskemo estas bezonata por dormi efike anstataŭ longe.

Ĉu aliaj sukcese modifis siajn dormociklojn tiel?

Ni malmulton scias pri la historio de plurfaza dormo. La Übermanskemo, tipo de plurfaza dormo, de temp' al tempe ankaŭ nomiĝas la 'dormoskemo de Da Vinci', ĉar laŭ klaĉo li dormis tiel. Tamen, tio estas disputata. Buckminster Fuller, fama kemiisto, dormis plurfaze dum 2 jaroj, sed li devis ĉesi ĉar ĝi ne kongruis kun la dormoskemoj de liaj negockolegoj. Lia dormoskemo, kiu nomiĝas Dymaxion, konsistis el 4×30 minutaj dormetoj en unu tago. Dum tiuj du jaroj, li havis tiom da tempo, ke li kontribuis multe al la fako de kemio. En moderna tempo, probable la plej eminenta pioniro de plurfaze dormo estas Puredoxyk, kiu plurfaze dormas plentempe ekde 2006. Post la disdono de ŝiaj personaj spertoj de plurfaza dormo tra blogafiŝoj, retartikoloj kaj libro, multaj sekvis Puredoxyk kaj fondiĝis interreta komunumo de eble centoj da sukcesaj plurfazaj dormantoj.

Kiel plurfaze dormi

Mi verkis libron en Esperanto pri plurfaza dormo, kiu estas senpage akirebla ĉe Wikibooks (eo.wikibooks.org/wiki/Plurfaza_dormo). Wikibooks estas libera projekto de la sama organizo kiu fondis Vikipedion, kies celo estas fari senpagajn manlibrojn. Mi elektis tiun eldonejon ĉar tiam ĉiu povas kontribui kaj plibonigi la referencon. En la libro mi klare priskribas kiel kaj kial plurfaze dormi. ■



La unua Esperanta Kinofestivalo

De la 10-a ĝis la 13-a de julio en San-Paŭlo, Brazilo, okazos la unua Esperanta Kinofestivalo, dum kiu estos prezentitaj konkursaj kaj nekonkursaj filmoj. La plej bonajn filmojn pri Esperanto kaj en Esperanto povos spekti la vizitantoj de la kinofestivalo el pli ol 20 landoj.

La kinofestivalo de Esperantaj filmoj konsistas el du programoj: konkursa kaj nekonkursaj. En la konkursa programo partoprenos mallongegaj filmoj kun daŭro de 5, 15 aŭ 30 sekundoj, kiuj havas trajtojn de filmo (enhavo, ideo, senco) kaj originale kreitaj por kinofestivalo en la internacia lingvo Esperanto. La kvin plej bonaj filmetoj, elektotaj de internacia ĵurio, konsistanta el E-artistoj kaj E-aktivuloj, feliĉigos siajn kreationojn per fama mp3-ludilo Apple iPod Touch 4 kun gravuraĵo de la kinofestivalo, kaj la filmaj gajnintoj estos prezentitaj al la spektantoj el pli ol 120 landoj.


La nekonkursaj programo prezentos dokumentaĵojn kaj ludfilmojn kun voĉtraduko aŭ subtekstoj en Esperanto. En la Esperanto-parto la organizantoj donos superrigardon pri moderna E-kinarto kaj prezentos aktualajn filmojn pri kaj en Esperanto. La ĝeneralan parton de la nekonkursaj programo partoprenos konataj filmoj, premiitaj dum grandaj internacia kinofestivaloj de la lastaj jaroj.

La kinofestivalo okazos samtempe

pe kun tri grandaj Esperanto-kongresoj. Ĝiaj partoprenantoj el pli ol 20 landoj havos ŝancon samtempe kun la kongresoj sekvi la konkursan programon kaj ĝui filmojn de la nekonkursaj programo akompane de aliaj artaj vesperaj prezentoj. Inter gastoj kaj amikoj de la kinofestivalo estas konataj filmofarantoj, reĝisoroj, aktoroj kaj pli ol mil simplaj esperantistoj kaj ŝatantoj de Esperanto.

Aleksander OSINCEV, la kreanto kaj kunordiganto de la kinofestivalo, klarigas kial li decidis okazigi tiun eventon:

"La ideo organizi Esperantan Kinofestivalon venis al mi ne hazarde, jam dum kelkaj jaroj mi kunordigas internacian teamon el pli ol 40 esperantistoj el kelkdeko da landoj, kiujn unuigas volontula projekto de tradukado de subtekstoj Filmoj.net. Tiu projekto donas ŝancon al ĉiu esperantisto spekti ŝatatajn filmojn, famajn filmojn aŭ male tute nekonatajn kun subtekstoj en la internacia lingvo. Kaj iam mi decidis, ke necesas supreniĝi al nova nivelo kaj prezenti Esperantan kinarton por



**<http://kinofestivalo.org/>
Trilingva retejo en Esperanto,
Angla kaj Portugala.**

la tuta mondo! Ni penos sekvi dum la kinofestivalo la ĉefajn fundamentajn ideojn, kiuj akompanas la Esperantomovadon dum la lastaj 120 jaroj: malfermiteco, foresto de politika, socia kaj lingva cenzuroj, subteno de lingva kaj kultura diversecoj".

Unu el la specifaj trajtoj de la organizado de la kinofestivalo estas tio, ke ĉiu laboro pri organizado efektiviĝas en interreto: kvin apartaj grupoj, konsistantaj el esperantistoj en diversaj landoj, prizorgas la kvin ĉefajn organizaajn direktojn de tiu granda internacia aranĝo. Kiu ajn povas partopreni la konkursan programon kaj plenigi aliĝilon rete. La oficiala partnero de la kinofestivalo estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

La oficiala retejo de la kinofestivalo estas <http://kinofestivalo.org>. Ĝi en tri lingvoj informas pri freŝaj novaĵoj, konkursaj kondiĉoj, prezentas konkursajn videojn kaj nekonkursajn filmojn. ■

Stereotipoj kaj realaĵoj

Malnova domo ĉe centra placo en Tjumeno, Rusio. Fotis la aŭtoro

Ĉiam mirigis min kiom forta estas la homa inklino al stereotipoj. Tio estas tute komprenebla afero, ĉar stereotipoj donas al oni pretajn ŝablonojn, kiujn oni povas uzi sen pripensi la ĉiufoje alfrontitan problemon aŭ situacion. Religio, propagando kaj similaĵoj abunde liveras diversspecajn vidpunktojn - jam formitajn kaj pretajn por digestado. Kiam mi unue interparolis pri politikaj aferoj kun alilandanoj, mi estis preskaŭ ŝokita pro la abundeco de tiaj stereotipoj.

Cetere ne, plejgrave mirigis min eĉ ne tio, ke alilandaj amaskomunikiloj manĝigas homojn per stultaĵoj - al tio mi antaŭlonge al kutimiĝis en Rusio. Mirinde estis kiom forte miaj oponantoj kroĉiĝas al tiuj ŝablonoj, kaj nur malmultaj post longa diskutado konsentis, ke eble iuj aferoj estis misprezentitaj al ili antaŭe. Plej bone tio vidiĝis dum disputado pri terorismo, Ĉeĉenio aŭ Gorbaĉov ks.

Sed antaŭnelonge mi havis oka-

zon renkonti similan konduton en mia propra lando, eĉ urbo. Miaj konatoj - profesiaj aranĝistoj de kultureventoj - petis min fari ekskurson tra la urbo por Tatjana Miĥalkova, fama rusia dezajnistino kaj la edzino de la famega filmreĝisoro Nikita Miĥalkov, filo de aŭtoro de soveta kaj rusia himnoj. Ŝi partoprenis en la ĵurio de loka dezajnista konkurso kaj petis konatiĝi kun la urbo.

Dum nia unu-kaj-duonhora promenado tiu ĉefurba damo, multe vojaĝanta tra la mondo, estis multe mirigita, vidante purajn stratojn, bonajn konstruaĵojn, kontentvizaĝajn homojn kaj - varman veteron! La lasta fakte ŝokis ŝin, alvenintan de neĝkovrita Moskvo en preskaŭ sennega Tjumeno. "Kiam mi vojaĝas al Eŭropo, mi telefonas tien kaj demandas pri la vetero, - diris ŝi. - Sed nun mi veturis al Siberio, do tuj prenis miajn plej varmajn botojn kaj vizonan felpalton". Tiun palton ŝi estis devigita jen demeti, jen sur-

meti denove, ĉar sub ĝi ŝi havis nur malpezan robon - mi neniel povis helpi al la povrulinio.

Fine de nia ekskurso ĉefurba stelulino demandis min: "Kial en televido oni montras nur malbonon, diras pri problemoj kaj neniam montras kiel reale vivas homoj en rusia provinco?" Mi havis nur unu respondon: "Malbonaj novaĵoj vendeblas pli rapide kaj multekoste".

Ĉu vere necesas ke ĉiu homo vizitu ĉiun lokon en la mondo kaj interparolu kun reprezentantoj de ĉiuj nacioj, kredoj kaj politikaj partioj por ke oni finfine senigu je tiuj damnitaj stereotipoj? Aŭ ili ĉiam regos la homajn cerbojn?

Almenaŭ de nun mi ne plu miros pri stereotipoj, disvastiĝantaj en okcidentaj landoj. Se eĉ en mia propra lando bone edukitaj, kulturaj homoj nutras sin per falsaj bildoj pri regionoj de sia patrujo, do kion diri pri alilandanoj? ■



Amuzaj skulptaĵoj en parko



Hundino en urba placo kun suba monokolektujo por hundoazilo



Sabla figuro honore al soldatoj de la Dua mondmilito



Saliko ĉe centra strato

Internacia Klubo "Staru sur via kapo"

En 2010, la Finno Markku Sarastamo kune kun sia amiko Alpi Ikäheimonen fondis la internacian klubon "Staru sur via kapo". Ili kolektas fotojn de homoj starantaj kapsube el pluraj partoj de la mondo.

"Jen kion mi pensas: Se ĉiuj homoj en la mondo starus sur la kapo, estus malfacile militi! Gaddafi, aliĝu al ni!" alvokas al la klubo Sarastamo.

Markku klarigas ke la klubo estas juna kaj neoficiala, kaj ĝia vera celo ne nur estas kolekti frenezajn fotojn: *"Ni volas fari kontakton kun personoj, kiuj volas vivi sen milito kaj kiuj vidas la vivon en diferenca vidpunkto"*, diras Sarastamo.

Alpi Ikäheimonen en rivero en Karelia, Rusio 2010



Markku, kiu loĝas en Littala, 100 km norde de Helsinko, unuafoje antaŭ multaj jaroj aŭdis de sia patro ke Esperanto estas bona lingvo, sed nur povis konkrete agnoski tion dum la UK en Japanio 2007. Nun li kontente parolas pri venontaj planoj: *"Venontan someron ni havos la unuan malgrandan kunvenon en Finnlando. Ni havos elementan kurson pri Esperanto, jogokurson kaj observos birdojn per teleskopo"*, rakontas la 63-jara judisto, kiu ankaŭ estas jogo-adepto.

Esperanto estas la oficiala lingvo de tiu klubo, kiu nuntempe havas 20 membrojn. Pri la homoj, kiuj




Markku Sarastamo staranta surgenue, sed ne surkape

staras sur siaj kapoj, li aldonas: *"Ni rigardas la mondon el alia perspektivo por trovi la vojon al paco kaj harmonio."*

Se vi volas aliĝi, vi povas sendi foton, kiu montras vin staranta sur via kapo, kun mencio pri la loko, la dato kaj viaj kontaktinformoj. La foto estos metita en niajn paĝojn. La kolektitaj fotoj estos poste eble uzataj en ekspozicioj kaj publikaĵoj. ■

Kontakto:sarastamo@gmail.com
http://www.sarasta.fi (Konstruata)



Bildo, kiu montras kiel stari surkape

KURIOZAĴO

abonu kun

40%

da rabato

Vi ricevas 20% da rabato je kolektiva abono*
Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako
al unu adreso, la rabato estas 40%!

Pliaj informoj:
kontakto.tejo.org

* ekde 6 abonoj



**LA PLEJBONON DE LA
ESPERANTO-MUZIKO VI
TROVAS NUR EN UNU LOKO...**



aĉetu originalajn diskojn
vinikosmo



Salutvorto

Saluton! Por la unua fojo mi salutas vin kiel redaktoro de TEJO Tutmonde. Do, mi diru ion pri mi, por ke vi sciu, kiu mi estas... :-)

Mi nomiĝas Daniel Mrázek, sed ĝefamilianoj kaj ĝeamikoj nomas min simple Dan. Mi devenas el Ĉeĥio kaj studas en la pedagogia fakultato ĉe Universitato de Karolo en Prago. Krom tio mi laboras en Ĉeĥa Radio, do mi havas multjarajn ĵurnalistajn spertojn. Mi esperas nun utiligi ilin ankaŭ por Esperanto, ĉar ĵurnalismo estas kun Esperanto mia plej granda hobbio.

Sincere dirite, mi mem scivolemas pri tio, kia estos mia agado kiel redaktoro de TT. Mi povas nur esperi, ke ĝi estos sukcesa... Mi ek troviĝas en nova rolo, do – almenaŭ dekomence – mi petas vin pri indulgemo kaj mi promesas, ke mi strebos lerni rapide. :-)

Certe mia agado ne estos sukcesa sen via helpo. TT informas pri vi – pri via agado, pri viaj aranĝoj, pri viaj impresoj pri junaj esperantoj... Tiunmaniere mi petas vin – dividi viajn travivaĵojn kun aliaj esperantistoj. Motivu ilin. Montru, ke ni vere vivas. Invitu ĝeamikojn el la tuta mondo al via aranĝo!

Mia celo estas krei iun teamon de kunlaborantoj kun TT.


Ĉu vi emas verki? Ĉu ĵurnalismo estas via hobbio? Ne timu labori por TT. Ni faru, ke TT estu ĉiam aktuala, ĉiam bonkvalita kaj altnivela.

Ĝi estu bunta, ĝi havu multajn interesajn informojn.

Tiunmaniere mi volas danki al mia antaŭulo Nicola Ruggiero. Miaopinie li kreis vere kvalitan bultenon. Mi strebos ne malaltigi ĝin kaj Nicolan mi sincere invitas al kunlaboro.

Mi estas ĉi tie je via dispono. Se vi havos demandojn (sed bv. ne tiun jam responditan :-P), konsilojn, proponojn ktp, ne hezitu skribi al mi per tejo-tutmonde@tejo.org. Mi ĝojatendas nian renkontiĝadon ĉe la paĝoj de la revuoj Kontakto kaj Esperanto kaj ĉe la retpaĝoj www.tejo.org!

Amike, Dan



Daniel Mrázek

IJK: Venu por esplori la nekutiman kulturon!

Kijivo. Ĝuste tiu urbo gastigos la 67an Internacian Junularan Kongreson kun la ĉeftemo Daŭropova evoluo – nova koncepto por homaro. Ĝi okazos ekde la 14a ĝis la 21a de julio 2011, do ĝis ĝi restas nur du monatoj. Laŭ la prezidantino de Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ) kaj membrino de LKK Svitlana Kozarenko, la preparoj estas en la meza fazo.

„Ni interkonsentas kun muzikistoj, trovis belan lokon por la unua koncerto en la centro de la urbo, planas ekskursojn, nun estas preskaŭ 200 aliĝintoj, kaj ni daŭrigas reklamon,” diras Svitlana. Ĉiu centa aliĝinto ricevos specialan donacon en la solena malfermo de la IJK. Antaŭ la limdato de tiu ĉi eldono de Kontakto, estis nur unu premio. La aliĝnombro 100 havas Thomas Cordonnier el Francio. La organizantoj esperas je ankoraŭ kelkaj gajnontoj.

Kiel jam Svitlana menciis, planata estas publika koncerto en la urbocentro. „Ni parolis kun kelkaj ukrainaj kantistoj kaj priparolo daŭras, inter Esperantaj kantistoj dum IJK ni esperas vidi JoMon, Martin Wiese kaj certe aliajn.”

Tradicia parto de IJK estas ekskursoj. La ĉijara kongreso estos je ili ege riĉa. „Pli ol 10 ekskursoj en Kijivo kaj apude, ekskursoj laŭ deziro ĉiutage kaj unu tago de plenaj ekskursoj „Ekskursita tago”. Multe estos tra la malnova centro,

certe ankaŭ al la plej belaj vidindaĵoj,” aldonas Svitlana. Se estos sufiĉe da interesiĝintoj, okazos ankaŭ ekskurso al Ĉernobilo. Ĝi situas 120 km de la urbo kaj 30minuta restado tie ne estas danĝera. Organizantoj tamen avertas pri alia danĝero – la eniro kostas 160 usonajn dolarojn por persono!

La kongreso mem okazos en bazejo en la suda parto de Kijivo kaj ĝi estas bone atingebla. „Apude estas lernejo, kies klasojn ni povas uzi por IJK. Estas tie malgranda stadiono por ludi futbalon, krome estas saltovojetoj por biciklistoj, arboj, manĝejoj estos organizita en la lernejo.” Svitlana plue anoncas, ke tiuj, kiuj mendas manĝaĵojn, gustumos ankaŭ ukrainajn manĝaĵojn.

Bedaŭrinde la ekonomia krizo trafis ankaŭ la IJKn, do la organizantoj devis altigi la prezojn de loĝado. „Sed la diferenco ne estas granda,” trankviligas Svitlana. Nepre do oni sekvu la paĝaron de IJK <http://www.ijk-67.retejo.info> kaj la tiean Anonctabulon.

Kaj la frazo por la fino? „Venu por senti vin en somerplena amika etoso, en festa kaj mojosa atmosfero, senti originalan ukrainan tradicion kaj esplori la nekutiman kulturon!”



Renkontiĝu kaj lernu

Inter la 30a de julio kaj la 7a de aŭgusto 2011 okazos la kvara fizika lernu!-renkontiĝo Somera Esperanto-Studado (SES). Ĉi-jare ĝi estos en la okcidentslovaka historia urbo Nitra, situanta 90 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava, 160 km de Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, kaj 155 km de Budapeŝto, la ĉefurbo de Hungario.

La programo konsistas el kelkaj partoj:

antaŭtagmeze - instruado pri Esperanto; posttagmeze - ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.; vespere - Nacia kaj Internacia Vesperejo, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 5 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Se aliĝos sufiĉe da interesiĝintoj, ekzistos ankaŭ eblo trapasi ekzamenojn laŭ la nova eŭropa

referenckadro.

Pri la lernu!-programoj zorgos lernu!-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

Do, nepre venu al SES 2011! Por pliaj informoj vidu la adreson www.lernu.net/ses kaj skribu al la organizantoj per ses@lernu.net.



Eksa redaktoro de TEJO Tutmonde Nicola Ruggiero: Mi estas anarĥiista verdulo kaj epikurano



TT: Nicola, unue mi dankas al vi por via ĝisnuna laboro. Kiel vi taksas vian redaktorado de TT?

NR: Ĝi estis la plej malbona de la lastaj dek jaroj. Bedaŭrinde dum mia redaktorado mi mem havis personajn malfacilaĵojn, kiuj aldoniĝis al la kutimaj problemoj de la revuo: manko de kontribuajoj, ofta miskvalito de kelkaj artikoloj, tro hazarda kompilado de la tuto, ktp. Do ankaŭ kompili simplan numeron foje montriĝis montgrimpado dum neĝa ŝtormo.

Tamen certe ekzistas io, pri kio vi fieras.

Miaj etaj atingoj tamen konsistis je la serĉado kaj trovado de kontribuajoj ekstereŭropaj, pri tio mi jes ja fieretas.

Ĉu vi ekhavis geamikojn danke al via redaktorado de TT?

Mi certe kontaktis nekonatojn, kiuj kontribuis ne nur artikole; foje ja okazis ret-babiladoj kun ili kaj tio naskis interesajn diskutojn pro malsamaj vidpunktoj kulturaj.

Do tamen via redaktorado estis riĉiga!

Samkiel ĉiuj homaj spertoj, ja eblas trovi la riĉigan flankon de la afero. :-)

Kiu redaktora laboro estis por vi la plej malfacila (kaj kiu estis male ege facila)?

Sendube, plej malfacile estis trovi freŝajn artikolojn kiuj ankaŭ post monatoj montriĝu plu freŝaj kaj aktualaj... Mi ja ofte fiaskis en tio. Ege facile ja estis trovi iom banalajn artikolojn pri kunsidoj de E-klubo en vilaĝo de Foralando, sed ilin mi provis ignori. :-)

Sed ili plenigus lokon. :-)

Jes, sed la tasko ne estas iamaniere plenigi, estas TAŬGE plenigi la revuon!

Do plia argumento, ke vi ne estis malbona redaktoro. Vi pensis pri kvalito.

Mi ja estis malbona redaktoro, ĉar ofte mi ne sukcesis kvalitigi la revuon kaj oftege ĝi aperis terure malfrue.

Kiuj estis viaj revoj kaj imagoj, kiam vi redaktoriĝis?

Mi volis plibonigi la grafikan aspekton, igi ĝin iom pli moderna, uzi taŭgajn fotojn, mi revis pri konstantaj kontribuajoj ekstereŭropaj. Mi esperis ankaŭ, ke tra la revuo iuj stimuliĝus por proponi modernigadon de TEJO, kiu multflanke ja estas moderna organizo sed je aliaj flankoj stagnas (mi pensas kaj pri membrokvanto kaj pri agadoj). La aktivuloj ĉirkaŭ TEJO estas eksterordinaraj homoj, tre energiaj kaj fortaj. Sed ili tamen, laŭ mi, bezonas novan

strukturen sine de TEJO mem; oni devus, ekzemple, laborigi la komitatanojn!

Pri kio vi avertas min kiel novan redaktoron?

Vi devas laborigi la komitatanojn kaj "ĝeni" ilin ofte. :-) Ofte demandu ilin pri la lastaj novaĵoj en propra landa sekcio kaj el frazo konstruu tutan paragrafon kaj, surbaze de ĝi, artikolon. Ne atendu, ke aliaj sendu artikolojn, vi mem serĉu kaj verku.

Kiun ĵurnalistan stilon vi ŝatas plej multe?

Mi ŝatas intervui la homojn, verki raportojn pri eventoj, recenzi librojn aŭ KDjn. Legantoj ja ŝatas legi intervjuojn, se ili kapablas (a) naski konstruajn diskutojn, (b) forigi dubojn, (c) stimuli partoprenadon en agado. Kompreneble tuta numero da intervjuoj estus tre peza, oni devas iom alternigi intervjuojn kaj pli prozajn artikolojn. Multaj homoj tamen ne ŝatas esti intervjuataj. Ofte temas pri tre modestaj homoj, kiuj laboregas senĉese kaj malgrandigas la monton, kiun ili ĵus grimpis; tasko de la redaktoro estas vidi laŭ oportuna lumo la tuton!

Kion vi male ne ŝatas, sed devis fari?

Mi ofte malŝatis aperigi burokratajn aŭ pufvortajn artikolojn, kiuj diris multegon sed rakontis nenion.

Vi estis la lasta redaktoro de TT kiel memstara bulteno. Ĉu ĝia nuna formo kiel TEJO-movadaĵoj plaĉas al vi?

Jes, ĉar tiel oni ja povas koncentriĝi pli ĉirkaŭ la kvalito ol la kvanto.

Nun iom pri vi – vi ŝatas verkadon. Pri kio vi verkis lastatempe?

Lastatempe mi verkis kelkajn poemojn sufiĉe strangajn, eĉ laŭ mia propra stilo, kaj de temp' al tempo mi provas verki prozaĵojn, kiuj temas pri simplaj priskriboj de la realo kiu ĉirkaŭas min.

Kiam vi eldonos plian libron?

Kiam mi estos skribinta sufiĉon por eldoni libron. :-) Nuntempe mi havas manplenon da poemoj, kaj tio ja ne sufiĉas.

Kion vi bezonas por verki?

Tempon kaj klarmensecon.

Vi estas italo loĝanta en Islando. Ĉu vi ne malvarmas? :-)

Ne, tute ne! :-)

Ĉu vi planas resti tie por ĉiam?

Ne, sed nun mi ŝatas resti ĉi tie.

Kie vi volas loĝi?

Mia revo estas loĝi en Berlino. :-) Ĉiam, kiam mi estis en tiu urbego, ĝi ravis kaj revigis min.

Do venas eble la plej disvastiĝinta demando inter esperantistoj: Kiel vi esperantistiĝis? :-)

Mi esperantistiĝis, kiam mi estis infano (ĉirkaŭ 11-jara) kaj en infanlibro mi trovis priskribon pri Esperanto, kun vortareto kaj gramatiko. Mi interesiĝis, legis, lernis, amis. :-)

Kial vi estas esperantisto? Ĉu vi kredas je fina venko aŭ vi simple volas amikiĝi kun homoj en diversaj landoj?

Mi ne kredas je la fina venko, sed mi ja esperas pri ĝi. :-) Kompreneble mi ŝatus, ke pli da homoj lernu kaj uzu Esperanton. Mi mem ŝatas amikiĝi kaj babilu kun homoj, kiuj havas malsamajn vidpunktojn.

Kion donis al vi Esperanto?

Ĝi plene riĉigis mian vivon, kulture kaj anime.

Kiu estas via viv-filozofio?

Mi estas anarĥiista verdulo kaj epikurano.

Kiuj estas la esprimoj pri tio? :-)

Nu, slogane? "Nul ŝtatoj, nul poluo, nul malfeliĉo!"

Kaj la lasta demando: Italoj ŝatas kuir – diru al ni iun receptaĵon.

Mi povas rakonti kion mi planas manĝi ĉi vespere. :-)

Lento-sup, 100gr da lentoj ("ripozigu" ilin en akvo dum almenaŭ du horoj), 1 malgranda cepo, 1 bulbero de ajlo, olivoleo, 1 celerio, 1 karoto, 1-2 laŭrfolioj

Haketi ĉiujn ingrediencojn (escepte de la lentoj kaj laŭrfolioj) kaj friteti en granda poto dum ĉirkaŭ 10 minutoj. En aparta poto pretigu ĉirkaŭ unu litron da varma akvo (simpla akvo aŭ buljono, elektu vi). Kiam la ingrediencoj estos pretaj (ili devas iom moliĝi) aldonu la lentojn, la laŭrfoliojn kaj la varman akvon, kirlu iomete kaj lasu ĝin boletadi. Ĝi bezonos ĉirkaŭ 1 horon kaj duonon por pretiĝi. Intertempe, gustumu kaj laŭplaĉe aldonu salon kaj pipron. (Aldono: kiam ĝi pretas, prenu aparte unu trionon, miksu ĝin ĝis kremigo kaj aldonu al la lentoj, la supo iĝos malpli likva kaj iom pli interesa). Mi mem ŝatas aldoni ion pikan ĝuste je la fino kaj manĝi la supon kun bona branpano. :-)

Bonan apetiton!

Elkoran dankegon! Ne nur por la receptaĵo, sed ankaŭ por la tuta intervjuo!

Dankon al vi. :-)

Entuziasmaj junaj esperantistoj en Hungario

SZABOLCS SZILVA - HUNGARIO

En la Hungara Esperanto-Junularo okazis jarĉefkunveno dum Junula E-Renkontiĝo (JER) inter la 12a kaj 14a de marto 2011. Ni sufiĉe bone sukcesis diskuti pri ĉio, kion ni planis. Dum la unua parto ni preparolis la okazintaĵojn en la jaro 2010, ni pritaksis kaj publikigis la detalojn pri financaĵoj, pri agado de HEJ, inter aliaj pri la monataj programoj. Tiu laste-menciita daŭre okazas ankaŭ nun. Por pli da informoj bonvolu viziti nian novan(!) retpaĝon: www.esperanto-junularo.hu/. Fakte nun la tuta retpaĝaro estas prilaborata kaj ankaŭ pere de ĉi tiu artikolo mi volas publikigi la informon, ke lanĉiĝis la novaj retpaĝoj de HEJ. La ŝanĝoj jam estis ege bezonataj.

Daŭre ekzistas la pli malnova ijs.hu/eo, sed ankaŭ tio en la proksima estonteco iom ŝanĝiĝos. Tie aperos informoj nur pri la aranĝo IJS mem. Sekve mi menciis la retpaĝon www.esperanto-junularo.hu, kiu iĝis la oficiala novaĵejo de nia asocio. Tie troviĝas ĉiuj informoj, kiuj rilatas al nia agado. La sekva estas la hungara versio de ĉi tiu retpaĝo www.esperanto-ifjusag.hu por ke ankaŭ la novaj hungaraj esperantistoj povu legi pri la novaĵoj. Kaj baldaŭ

finpretiĝos jer.hu, kie troveblas informoj nur pri la aranĝo JER. (Ĉi-lasta ne estas ankoraŭ lanĉita ankaŭ pro ne-aktualeco: la sekva JER okazos en printempo 2012). Nun ĉio estas klare distingita kaj laŭ aranĝaĵoj (IJS, JER, monataj programoj



ktp...), kaj laŭ lingvoj (Esperanto, kaj la hungara). Mi, kiel nova ĉefredaktoro de la retpaĝaro kun Vilté Székely (kaj fakte per multe da helpo de Bálint Rikker), atentis ankaŭ pri la opinioj de eksterhungariaj esperantistoj (inter aliaj mi volas danki Paweł Fischer-Kotowski pro la konsiloj). La rimarkoj ankaŭ nun bonvenas de ĉiuj.

Mi volas ĉiujn atentigi, ke al Internacia Junulara Semajno 2011 eblas jam aliĝi en ijs.hu/eo. Ĝi okazos en la ĉirkaŭaĵo de Budapeŝto en urbo Búbánatvölgy. Ĝi estos signife pli malmultekosta ol lasta-jare, sed almenaŭ tiom mojosa (kiel ekz-e pro la akvobatalo, Esperanta kazino kaj la aŭkcio, kie eblos tuj elspezi la ĵus gajnitajn E-monojn). Venu ankaŭ vi!

Sekve dum la kunveno okazis balotado pri la sekva estraro de HEJ. Petra Smidéliusz denove estis elektita kiel prezidantino. Unu persono forlasis la estraron kaj du aliaj aniĝis (inter tiuj lastaj estas ankaŭ mi). En la retejo www.esperanto-junularo.hu/ estas ĉiuj informoj atingebaj ankaŭ pri la nova estraro.

En la lasta parto ni aŭskultis la opiniojn de tiuj, kiuj la unuan fojon partoprenis Esperantan renkontiĝon. Ni havis almenaŭ 3 novajn personojn. En nia nova retpaĝo legeblas la raporto de nova esperantistino Enikő Urbán pri JER. Post la preparado de la ĵus spertitaj aferoj ni diskutis pri la futuro de Esperanto en Hungario, kaj pri la estonta agado de nia asocio. Laŭ la planoj daŭre estos okazigataj la monataj programoj, JER, kaj IJS. Ni planas kunlabori kun aliaj E-asocioj, kaj ni helpos senĉese al la junaj kaj novaj esperantistoj enmovadiĝi ĉiel, kiel eblas ĉe nia asocio.

Ĉu vi ĉu vi ĉu vi volas verki?

TEJO Tutmonde bezonas konstantajn kontribuantojn. Ĉu vi estas verkema? Ĉu vi volas esti ĵurnalisto? Ĉu vi interesiĝas pri junulara Esperanto-movado? Do ĝuste vi kapablas esti teamano de kontribuantoj al TEJO Tutmonde!

Kial bezonatas la teamo? TEJO Tutmonde funkcias kiel ĵurnalo. Kadre de ĝi aperadas aktualaj informoj ĉe la retpaĝo www.tejo.org. Se vi volas legi vere aktualajn kaj interesajn artikolojn pri junulara esperantista agado en la tuta mondo, TT ne povas baziĝi nur sur unu homo. Ju pli da kontribuantoj, des pli altnivela kvalito.

Kial esti teamano? Vi akiros aŭ profundigos ĵurnalistajn spertojn. Vi laboros en internacia teamo, kio ĉiam estas riĉiga. Vi grave kontribuos al bonkvalitaj informado kaj prezentado de junaj esperantistoj tutmonde. Do ankaŭ danke al vi estos klare, ke Esperanto vivas kaj vivos, ĉar ĝi estas hobiaĵo de multaj gejunuloj. Cetero danke al via konstanta laboro vi ankaŭ famiĝos. :-)

Kiom da teamanoj bezonatas? Senfine :-). La nombro ne estas limigita. Eĉ bonas, se en unu regiono estos pluraj teamanoj. Laŭ interkonsento ili dividos sian laboron.

Kiel vi laboros? Vi prizorgos junularan E-agadon en via regiono. Vi faros intervjuojn, verkos raportaĵojn aŭ vi nur simple donos instigon, pri kio en TT informi. Teamanoj komunikos per rete – aŭ pere de retmesaĝoj aŭ pere de skajp-konferencoj. Ni estos unu granda tutmonda redakcio.

Ĉu “konstante” nepre signifas ĉiam? Tute Tute ne! “Konstante” signifas, ke vi prizorgos tion kio okazadas en via regiono, kaj se vi prijuĝos tion interesa, vi skribos pri tio. Do ne nepre

ĉiam vi devos labori, oni postulos de vi nur tiom da tempo, kiom estos en viaj kapabloj. Vi servos kiel tiu, de kiu TEJO Tutmonde povas peti helpon, se estos neceso.

Ĉu nur teamanoj rajtas kontribui? Denove: Tute ne! Teamanoj estas tiuj, kiuj volas labori por TEJO Tutmonde iomete pli intensive. Memkompreneble ne estos rifuzitaj unufaj kontribuantoj de ĉiu ajn. Eĉ teamano povas peti iun alian verki artikolon. Teamano fakte estas „ponto” inter redaktoro pri TEJO-movadaĵoj kaj legantoj.

Ĉu teamaniĝi alportas avantaĝojn? Nepre jjes! Krom tio, kio jam estis menciita (inkluzive la famiĝon :-), vi havos ŝancon, ke vi – danke al viaj spertoj – fariĝos venonta redaktoro de TT, kaj informado pri junularaj movadaĵoj konstante evoluos kaj plibonkvalitiĝos.

Ĉu teamaniĝi alportas malavantaĝojn? Se vi iun trovos, nepre nin informu! :-). La samon faru kaze de viaj demandoj kaj aliĝoj al la teamo! Skribu al tejo-tutmonde@tejo.org!

Ĉu vi volas esti informata aktuale?

Jen por vi ekzistas blogo de TEJO Tutmonde ĉe www.tejo.org. Ĝia adreso estas: <http://www.tejo.org/eo/blog/8543> Tie vi trovos la plej aktualajn informojn pri junulara agado tutmonde!

Francaj esperantistoj biciklis en Kubo

GUILLERMO BES SALAZAR - KUBO

Francaj geesperantistoj Jean-Jacques, Marlène kaj Kristopher el la urbo Membrolle alvenis Kubon la 23an de februaro 2011. Ili veturis tra Kubo bicikle kaj tranoktis ĉe kubaj geesperantistoj kaj neesperantistoj. Vendrede la 25an de marto ili vizitis la Provincan Filion de Esperanto en Santiago de Kubo kaj renkontis la esperantistaron tie. Ili ankaŭ ĝuis lecionon gvidatan de Gonzalo Collantes García (multjara esperantisto kaj instruanto de Esperanto). Dum la leciono ili ankaŭ ĝuis la kanzonon Belega Kamparanino kaj rakontis siajn spertojn pere de Esperanto tra la mondo.

Ili diras, ke Esperanto estas gravega lingvo por la internacia komunikado kaj ĝi ankaŭ estas ŝlosilo por lingva demokratio.

La ĉefa celo de tia renkontiĝo estis montri al la novaj lernantoj,



ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj ke ĝi taŭgas por la internacia komunikado kaj pere de ĝi oni povas koni aliajn kulturojn en la tuta mondo.



Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 1 76 - NL-301 5 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (01 0) 436 1 751 ,
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Prezidanto, Eksteraj Rilatoj: Gregor HINKER gregor@tejo.org
Informado, unua Vicprezidanto: Oleksandra KOVYAZINA sasxa@tejo.org
Ĝenerala Sekretario: Paulína KOŽUCHOVÁ paulina@tejo.org
Landa Agado, Vicprezidanto: Irmina SZUSTAK irmina@tejo.org
Kasisto: Sergej TYRIN kasisto@tejo.org
Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto: Lukasz Maciej ZEBROWSKI lukiz@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun TEJO-Tutmonde rubiko
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn)

kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subteno la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadaroj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!



2011
14a - 27a de Julio

IJK EN UKRAINIO

www.ijk-67.retejo.info



**LA ĈEFTEMO:
DAŬROPOVA EVOLUO:
NOVA KONCEPTO POR HOMARO**

